# Vertikale

Trimonata
periodaĵo
por la aktivuloj
de FEL

septembro 1992
-
septembro 1993



Flandra Esperanto-Ligo
Estraro
*Prezidanto:* Alex Humet
*Membroj:*
Roland Rotsaert
Paul Peeraerts
Jos Vandebergh
Jean Pierre Allewaert
Pieter Vets
Jorg De Mulder

Komisiitoj:
*Financoj:*
Roland Rotsaert
Paul Peeraerts
Gerd Jacques
*Eldona agado:*
William Auld
Gerrit Berveling
Chris Declerck
Rejna de Jong
Alex Humet
Paul Peeraerts
*Instruado:* Raymond Wylleman
*Informado:* Edward Symoens
*Dokumentado:* Marc Vanden Bempt
*Rabata servo:* Germain Pirlot

Oficejo
La oficejo de FEL troviĝas en Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen. Ĝi estas malferma por la publiko ĉiun labortagon inter la 9a kaj 12a30 kaj inter la 13a30 kaj 17a30. Vizitantoj bonvolu tamen anticipe interkonsenti pri rendevuo. Telefono (9-12.30 -- 13.30-17.30h) (03) 234 34 00 - telekopiilo (tagnokte): (03) 233 54 33.

La adresoj de la supraj personoj estas troveblaj en la adresaro malantaŭe en Vertikale. Tie vi ankaŭ trovos la adresojn al kiuj referencas la asteriskoj post kelkies nomo en artikoloj.

# Enkonduko

En la unua numero legeblis iuj klarigoj pri Vertikale, i.a. ke ĝia celo estas alporti iom da glasnosto kaj perestrojko en la flandran E-movadon. Sufiĉe cinike ni sukcesis atingi la malan rezulton nuliginte Informilon kaj ne aperigante Vertikale-n. Certe la agado suferis pro tiu ĉeso de informfluo inter aktivuloj. La estraro tre bedaŭras pro la ĝisnuna fuŝo kaj pardonpetas. Tamen nun ni ŝatus forgesi pri ĉio pasinta por fari novan starton per eĉ pli da entuziasmo ĉar per novaj fortoj.

## Pri Vertikale

La strukturon ni iom ŝanĝis por ankoraŭ pliklarigi la superrigardon de la movada labirinto. Ni esperas ke ĝi nun estas plej bona kaj restos.

## Kontribuoj

Ni dankas al tiuj kiuj sendis kontribuon por tiu ĉi numero kaj samtempe alvokas al plua/plia kunlaborado. Vi sciu ke ni aperigos ĉion kio rilatas al la E-movado. Ne necesas posedi literaturan talenton por verki ion por Vertikale. La celo estas koncize raporti, anonci aŭ sciigi. Menciu precipe faktojn, nombrojn, do ekzaktaj donitaĵojn. Nur mallonge aldonu vian impreson se temas pri iu aranĝo, poste vi povas fari prelegon pri tio. Ĉu ne sukcesas vi sufiĉe koncizigi? Ne gravas, sendu kion vi havas kaj ni faros. SED SENDU!

# Moto

En la jaro 1889 aperis de D-ro Esperanto teksto el kiu nun sekvas ekstrakto.
"Celon ni ĉiuj havas unu kaj klaran: ke la nombro de l' amikoj de l' lingvo internacia, la nombro de l' personoj uzantaj tiun lingvon kaj laborantaj por ĝi, konstante kresku, kaj ke la lingvo ĉiam pli riĉiĝu. Por tio ni ne bezonas kondukanton: ĉia persono, ĉia rondeto, ĉia societo laboru laŭ sia bontrovo, en sia sfero kaj laŭ siaj fortoj, kaj malgraŭ la disjeteco de l' laboro (se ĝi nur estos ĉie sufiĉe energia) post la plej mallonga tempo ni vidos, ke nia komuna celo estas alvenita, ke la lingvo internacia fortiĝis kaj estas uzata de la tuta mondo."
La oktobra numero (92) de la informilo de La Konko (la ostenda klubo) jene komentas ĉi-tekston:
"Post la legado de tiuj (tro?) esperplenaj vortoj ("...en la tuta mondo") via reago povas esti: Nu, rigardu la rezulton post cent jaroj! Senutilas daŭrigi la laboron. Neniam Esperanto estos... Tia ne estas mia reago. Mi pensas pri la belaj momentoj, la koraj amikecaj kontaktoj kiujn Esperanto ebligis kaj ankoraŭ ebligos al mi. Laŭ mi Esperanto havas du estontecojn: unu proksiman kaj unu malproksiman.

# Uzado

## Okazis

**Bosna esperantisto prelegas en HIVT - 25 mar 93 (jdm)**
Proksimume 50 studentoj de la antverpena Altlernejo por Tradukistoj kaj Interpretistoj (HIVT) aŭskultis prelegon de Smail Grbo, la bosniano kiun invitis FEL unu semajnon. Smail mallonge prezentis sin kaj menciis i.a. ke pere de Esperanto li travojaĝis la 5 kontinentojn. Poste li dum pli ol unu horo en la germana lingvo prelegis pri sia lando kaj la milito. Li montris memfaritan filmon pri antaŭmilita Jugoslavio. Ĝi estis provizita de esperanta komentario kaj tiel la publiko denove kontaktiĝis kun Esperanto. Dum la filmo pludaŭris ekestis vigla diskuto, unue nur inter unu instruistino kaj la preleganto, sed poste enmiksiĝis ankaŭ studentoj kaj fariĝis interpublika diskutado. Bedaŭrinde ni devis ĉesigi la preskaŭ duhoran eventon ĉar la sekva leciono komenciĝu. Certe estis agrabla ŝanĝo por la studentoj foje aŭskulti bosnianon anstataŭ la gramatikumadon de la instruistino. Por FEL certe ankaŭ estis agrabla okazo: Dank' al ĉi-prelego triono de la honorario kiun ni promesis al nia samideano estis pagita de universitata mono!

**Flandra ĉeesto de IJK - Vraca 7/14 aŭg 93 (jdm)**
La ĉi-jaran IJK-on partoprenis 5 flandraj gejunuloj: Geert, Els, Yves, Lode kaj Jorg. Ke ili estis sufiĉe ravitaj de ĝi ja montriĝis dum la prelego kiun ili prizorgis la 17an de septembro en La verda stelo. La 49an IJK-on partoprenis homoj el 34 landoj, i.a. el Israelo, Irano, Meksikio, Usono, Rusio, Koreio, Ĉinio kaj Japanio. Entute ĉeestis 180. Oficiale malfermis la kongreson valona kantistino Nikolin' (ĉu konata de niaj veteranoj?). En la TEJO-komitato enuis anstataŭanto Jorg. Prepariĝu por la 50a kongreso en Sud-Koreio!

**Somerumantaj esperantistoj en Flandrio - sep 93 (jdm)**
Je la fino de la somero vizitis nian landon kelkaj alilandaj gesamideanoj, la plimulto tamen iom haste, kvazaŭ fulmo. Unue venis du tagojn juna Usonano, Joseph Truong, kiun ĉiĉeronis Ivo Durwael tra Antverpeno. Proksimume unu semajnon poste alvenis du ĉeĥinoj petveturante el Nederlando kien ili post 5 tagoj revenis. Ĉi-foje mi havis la agrablan honoron montri al ili nian belan kulturan ĉefurbon. Poste ili vizitis memstare Bruselon kaj Bruĝon, malmultekoste veturante per Go-Pass

kiam mi al ili konsilis aĉeti (ili volonte konsentis kun tiu elspezo spertinte ke petveturado en Benelukso ne estas tiom memkomprenebla ol en ekz. Germanio). Septembre venis en Belgion Ruso el Murmansk. Li precipe loĝis pasportaserve en Warneton kaj ekskursis de tie kun sia gastiganto. Tamen li ankaŭ unu tagon venis al Antverpeno kaj profitante miajn ankoraŭajn feriojn mi denove rolis kiel gvidanto. Je la 17a de septembro finfine gastoj venis en klubon: Xigen Wang kaj Ruixiang Wang el Ĉinio. La unua peresperanta komercisto, la alia partopreninto de la IJK kiu nun volontulas en la CO. Tiu dua do venis ĝustatempe, ĝuste kiam la klubvespero en la Verda Stelo estis pri la IJK.

## Ideoj

**Kial ne kunlabori kun ne-esperantistoj? (gp + nemovadano)**

20jara sperto kokludigis al mi ke la plej grava malamiko de Esperanto estas kluba sektismo. Ofte ŝajnas ke esperantistoj malŝatas uzadon de la kara lingvo por nemovadaj celoj! Jen mallonge ekzemploj kiujn mi spertis kun la E-movado.

*Eŭropa semajno de Eŭropa Asocio de Instruistoj*

Dank'al patro Bussé, lernejestro en Hannut, Esperanto iĝis laborlingvo apud la franca, la germana kaj la nederlanda dum ĉiujara Eŭropa Semajno: tio okazis en Hannut kaj Freiburg. Bedaŭrinde kaj malgraŭ avertoj, samideanoj kondutis sekte kaj tedegis aliajn partoprenantojn per senĉesaj klopodoj por esperantigi ilin.

Konkludo: La Eŭropa Semajno pluiris sen Esperanto!

*Eŭropa Dokumentaro*

Post preskaŭ dujara kontakto kun estro de eŭropa centro, s-ro Goovaerts, instruisto pri fremdlingvoj sukcesis aperigi Esperantoversion de Eŭropa Dokumentaro, sed neniam eblis trovi en Bruselo samideanon pro helpi pri korespondado en Esperanto (ĉ. 3 horojn monate); mi mem devis iri el Oostende por prizorgi ĝin, ĝis kiam la elsendadon transprenis Eŭropa Klubo en Paderborn.

*Rilatoj ILEI - Eŭropa Asocio de Instruistoj (EAI)*

<u>A. Tradukreto</u>

S-ro Kech, ataŝeo ĉe ministrejo pri edukado kaj eŭropa prezidanto de EAI, petis starigon de tradukreto pere de Esperanto por EAI. Sed la tiama ĝenerala sekretario de ILEI, d-ro Dazzini rifuzis kunlabori pro statutaj kialoj!

Kiel EAI-ano mi funkciigis tian reton al kiu kunlaboris esperantaj kolegoj el kelkaj landoj, i.a. Germanio, Grekio kaj Italio.;

<u>B. Rilatoj ILEI - EAI</u>

ILEI petis kunlabori kun EAI kaj tiurilate mi partoprenis tritagan kunvenon en Parizo, kie mi reprezentis ILEI-n kun s-roj Fairbank (F), Leon-Smith (GB) kaj Piron (CH). Ni trafis kontentigan rezulton, sed tiam la estraro de ILEI (d-ro Dazzini kaj s-ro Sonnabend) aldonis nepran kondiĉon: ke Esperanto estu LA sola laborlingvo por ĉiuj rilatoj.

Konkludo: La tuto fiaskis.

*Monda Federacio de Kuracistoj kiuj respektas la homan vivon*

D-ro Schepens, ĝenerala sekretario de MFKRHV jam tradukigis dokumentojn en Esperanton, de tri jaroj konsentas ke Esperantoangulo estu en la federacia bulteno. Sed ĝis nun UMEA (Universala Medicina Esperanto-Asocio) neniel reagis al tiu propono! Ĉu ne interesus ĝin kunlabori kun MFKRHV kiu arigas ĉ. 350000 membrojn el 70 landoj?

*Blua Mondĉeno - Asocio por la protektado de bestoj*

Post esperantigo de la universala deklaracio de la bestaj rajtoj, tiu ĉi asocio ricevis multajn leterojn en Esperanto el diversaj landoj, eĉ el Ĉinio. Tia rezulto vekis interesiĝon pri Esperanto, sed bedaŭrinde ĝis nun (12.04.93) ne eblis trovi bruselan samideanon por helpi pri korespondado en Esperanto (eble 2, 3 horojn monate)!

*Konkludo*

Pli kaj pli mi demandas min ĉu vere endas veki interesiĝon pri Esperanto ĉe ne-esperantistoj. Kiam ili pretas uzi Esperanton, la esperantistoj mem rifuzas helpon, verŝajne ĉar ne temas pri tradiciaj klubaĵoj.

Laŭ mi gravega manko en Esperantujo estas ekvilibro inter saĝa idealismo kaj sana realismo. Se esperantistoj deziras ke Esperanto restu nur kluba hobio, tiam ĝi jam finvenkis de dekjaroj (aŭ jardekoj)!

**Koresponda projekto en Gent (La Progreso)**

Ĉar Gent antaŭ kelkaj jaroj ĝemeliĝis kun la estonia ĉefurbo Tallinn, la membroj de la genta esperantoklubo La Progreso volas starigi aktivan korespondadon kun membroj de la Tallinn-a E-klubo. La celo estas interŝanĝi ideojn, spertojn, interesojn ktp. praktikante Esperanton.

La unuaj kontaktoj jam efektiviĝis kaj ni esperas ke ĉi tiu eksperimento estu fruktodona. Eble sekvinda ideo por aliaj belgaj E-kluboj?

**Mono por prelegvojaĝoj - sep 93 (jdm)**

Ĉu ankaŭ vi scias pri tiaj eblecoj kiaj en la artikolo pri la Bosniano? Ĉu vi havas kontaktojn kun instancoj/kluboj kiuj interesiĝas pri prelegoj de alilandaj gastoj kaj kiuj honorarias tion? Ĉi-kampe ni povus ege utiligi Esperanton. Imagu kiom avantaĝe estus se ni povas kontraŭpage preleĝigi niajn esperantogeamikojn. Kaj ili kaj ni bonfartos per tio! Ni disvastigas Esperanton kaj havas bonan programon por niaj kluboj kaj ili mone iom pliboniĝas. Informiĝu ĉe kulturaj organizoj, lingvokluboj, universitatoj, ktp kaj sciigu al Vertikale kion vi eltrovis. Sukceson!

# Instruado

**Konkurso inter la angla kaj Esperanto - Ukrainio - M Popov (*) (jdm)**

En urbo Slavjansk okazis eksperimento laŭ instrukcio de la rektoro de Internacia Instituto pri Mastrumado. El 300 studentoj estis formitaj du grupoj: unu el studentoj kun altaj poentoj pri angla lingvo (post 6-7 jaroj da lernado), alia kun ajnaj poentoj. Oni organizis du ekspreskursojn: por la unua grupo de angla lingvo, por la dua de Esperanto. La studentoj ĉiutage lernis po ok horoj. En la kvina tago la partoprenantoj ekparoladis en Esperanto kaj du tagojn poste prezentis surscenejan programon kun kantoj, deklamado, ktp. Spektinte la prezentadon la instruistoj de la anglalingva grupo petis tri semajnojn por daŭrigi. Post tio okazis prezentado nur 20-minuta, kun konsiderinda parto da trumpetmuziko.

La gvidantoj de tiu kurso, 7 kompetentaj instruistoj, formas en la instituto katedron de Esperanto.

**ILEI: trijara laborplano - 92-94 (ah)**

1. Sekcio kaj membraro: kontakti, revigligi, admoni, kuraĝigi la diversajn sekciojn kun speciala atento al la ĉina kaj korea. Starigi novajn sekciojn en orienteŭropaj landoj kaj Aŭstralio, Kubo kaj Meksikio. Eldoni freŝan varbilon.
2. Komisiono kaj komisiitoj: malcentrigi la laboron kaj krei reton. Transigi rutinajn taskojn al hororariitoj.
3. Financo: kreskigi kapita-

lon, alvokadi al donacoj, testamentoj. Ricevi monon el ekstermovadaj instancoj por edukaj projektoj. Alirigi servojn ankaŭ per nekonverteblaj monvalutoj. Starigi novajn vojojn por akcepti kotizpagon per varoj aŭ servoj.
4. Lingvaj ekzamenoj: reekzameni postulojn de la elementa kaj meza. Krei konsilaron por la ekzamenantoj. Pluproponadi ekzamenojn. Revizii kaj reeldoni gvidilon por ekzamenotoj. Lanĉi superan nivelon.
5. Servoj al instruistoj: registri kursojn kaj kondiĉojn de instruado en diversaj landoj. Aperigadi korespondpetaron, individuan kaj klasan. Akceli kontaktojn interklasajn per listo de lernejoj kiuj akceptos vizitantojn. Starigi aŭ diskonigi ekzistantajn naciajn/sekciajn servojn.
6. Instruista trejnado, universitata agado: apogi kaj organizi internaciajn metodikajn seminariojn (unua okazu en Ĉinio ĝis 1994), kun ĉiaspecaj fortigoj de la metodika flanko (ILEI-gimnazio kadre de la konferenco). Peri inter universitatoj per (duon)oficialaj kursoj. Diskonigi disertaciojn en/pri Esperanto kaj la eblecojn por internacia klerigo.
7. Konferencoj: logi praktikantajn instruistojn. Fortigi la fakan programon kaj diversigi la kunventipojn (diskutado, rondaj tabloj, montro-lecionoj, rol-ludoj, ekspozicioj, ks.). Faciligi interŝanĝojn pri sperto.
8. Eksteraj rilatoj: kontaktadi UN-n kaj Uneskon, kun partopreno en la "jaro de la familio" (1994), kaj aliajn internaciajn edukajn organizaĵojn (konstrui superrigardon kaj reprezentiĝi). Aktive kunlabori en la projekto "Eŭropo 92" de UEA/ILEI/EEC. Proponi nacilingvajn tradukaĵojn pri edukado, internaciismo, propedeŭtika, praktika kaj etika valoroj de Esperanto, rezultoj de Esperanto-instruado.
9. Eldonado: Eltrovi nekostajn kompost- kaj preseblecojn. Akiri taŭgajn manuskriptojn. Krei administran bazon por pretigi librojn, kun kovrado de kostoj ene de 12 monatoj. Prioritatoj: lernolibroj, sonkaj vid-bendoj, pedagogiaj, instruistaj kaj ekzamenaj gvidiloj, materialo pri lingvaj problemoj.
10. Movada agado: Informi per UEA kaj fortigi la "tagon de la lernejo". ILEI reĝisoru edukan ĉeftemon de iu estonta UK. Avangardi en la debato pri planado kaj strategio laŭ la proklamo de Voss (1991). Kontakti aliajn movadajn asociojn (LIBE, TEJO, AIS, ELTE, KCE, IEI, TEC...).
(Impona plano sed kiu bedaŭrinde ne parolas pri la kiuj, la kiamoj kaj la kieloj. Viaj komentoj bonvenas! -ah)

# Informado

**Gvidlibro kaj promenadoj tra historia Bruselo - H Falk (jdm)**
Tio estas la titolo de 31-paĝa libro antaŭnelonge aperigita de Hélène Falk. Ĝi enhavas bildojn kaj mapojn kaj kostas 200 BEF. Mendu sendante la monon aŭ ĉekon al ŝia adreso (*).

**Flandra-valona renkontiĝo en Verviers: 23-29 aug 92 (gvh/jdm)** 5 junaj flandroj kaj 5 junaj valonoj kiuj intencis lerni Esperanton partoprenis en tiu ĉi renkontiĝo, kiu estis organizita de SCI ("Service Civil International") kaj FEL, kun subvencio de la fonduso reĝo Baldueno. Ĉiumatene la gejunuloj lernis Esperanton de kroata esperantisto, Ivan Ŝtef kiu uzis la de li kunverkitan zagreban metodon. Posttagmeze kaj vespere estis ĉiaj aktivecoj organizitaj, i.a. teatrumado kun Katrin' Samain.

Sekvas raporto farita de Pascal Duterme, respondeculo de SCI kaj Alex Humet, prezidanto de FEL.
La decidon organizi tiun ĉi renkontiĝon helpe de FEL kaj la fonduso reĝo Baldueno ni faris ĉar la celoj de ĉi tiuj asocioj similas inter si. La esperantista ideo de interpopola interkompreniĝo estas ankaŭ la bazo de la filozofio de SCI. Kaj la celo al kiu strebas la fonduso reĝo Baldueno per la projekto "Tri traboj starigitaj" kongruas ankaŭ al nia: "Rompi la stereotipojn kaj antaŭjuĝojn kiujn naskas la nescio".
Ni sukcesis atingi niajn celojn: la nederland- kaj franclingvaj gejunuloj lernis kompreni iliajn kulturojn, konstatante ke ne la diferenco de lingvo estas la ĉefa baro, sed ja la eraraj ideoj kiujn disvastigas la amaskomunikiloj.
Ankaŭ la kunorganizintaj esperantistoj kontentas: ĉiu partopreninto enkondukiĝis en la lingvon kaj pluraj el ili deziras daŭrigi la lernadon.

Jen sperto de unu partoprenintino, Astrid (16)
*"Tiu ĉi semajno estis en la signo de la frateco kaj tion mi ege ŝatas. Mi ne tre rapide forgesos ĝin. Mi lernis Esperanton sed mi ankaŭ lernis kune estadi kun personoj kiuj ne parolas la saman lingvon kaj danke al E-o ni sukcesis interkomuniki. Estas bonege interkompreniĝi en mondo kie komunik-maleblo sufiĉe oftas! Mi ne imagis tiom lerni en unu semajno."*

**Nova libro de Yvo Peeters (kompilinto) (ah)**
Yvo Peeters, politikisto de VU, sekretario de la flandra ministro pri ekonomio estas ankaŭ, en libera tempo(!), sekretario de la Internacia Akademio por Lingvaj Rajtoj. Nun li anoncas novan libron, en la franca, aperintan fine de 1992 kaj kompilitan de li: "Langues et Identité". Jen kelkaj el la ĉapitroj: La lingva rajto (J Turi), Etnaj minoritatoj (H Giordan), Lingvoj en kontakto - lingvaj konfliktoj (P Nelde), Lingvafranko (A Chiti), Nacia, regiona kaj socia identecoj (C Ricq), Eŭropa unueco kaj kultura diverseco (H van Impe), Franca Flandrio (J Fermaut) k.a. La libro estas dediĉita al profesoro Guy Heraud kaj inkluzivas kompletan bibliografion de ĉi lasta. Tiuj kiuj volus ĝin ricevi bv. ĝiri 900 BEF al la konto ASLK 001-1689371-95 de I.E.V./CIFE en Bruselo.

**La Eŭropa Socialdemokrata Partio (ESP) - G Pirlot - feb 93 (jdm)**
Germain Pirlot (*) ricevis leteron de Ph Busquin, prezidanto de la franclingva socialista partio de Belgio (temas pri solvo de lingva problemo ene de ESP): "... viaj argumentoj kaj tiuj de Claude Piron en lia artikolo favora al Esperanto igas min pensema, sed, **bedaŭrinde, la plej raciaj formuloj ne ĉiam estas la plej facile akcepteblaj!**" G Pirlot poste argumentas al ni ke tiuj ĉi vortoj avertas nin pri tio ke "estus stultege sugesti ke ESP adoptu nun ankaŭ Esperanton kiel laborlingvon. Nur iom post iom ni informu la ESP-anojn. Ni atentigu unue pri la demokrata utilo de Esperanto kaj due pri la pedagogia, kultura, socia kaj homara valoroj de Esperanto. Certe neniam forgesu ke en inform-kampanjo realismo superu idealismon!"

**E-o informoj en flandraj bibliotekoj (yn)**
La kalmthout-a grupo metis inform-dokumentujon en la lo-

kan plublikan bibliotekon. Por kreskigi tiun ĉi iniciaton estis starigita laborgrupo. Ĝiaj membroj kompilos dokumentujon uzeblan por tuta Flandrio. Ili petos la helpon de la lokaj grupoj je la disvastigo kaj la aldono de lokaj informoj (adresoj, kursoj, ktp). Kunlaboremuloj bv. kontakti Y Nevelsteen (*).

**Debato pri toleremo kaj integriĝo - 21 dec 92 (gvh)**
Je la 21a de decembro FEL organizis en la E-centro debaton pri toleremo kaj integriĝo de enmigrintoj, okaze de la kreskanta rasismo, precipe en Germanio. La celo de tiu ĉi nederlandlingva debato: interparoligi Belgojn kun enmigrintoj kaj esperantistojn kun neesperantistoj. Ni invitis du politikistojn de Agalev kaj reprezentantojn de la turka kaj marokana komunumoj en Flandrio. Krome estis bonvenaj ĉiu ajn por kundebati (ankaŭ rasistoj sed ili ne venis). Por anonci la iniciaton ni telefonis kaj sendis leteron al organizoj kiuj okupiĝas pri enmigrintoj kaj kontaktis la gazetaron kaj aliajn komunikilojn. Rezulte Het Volk aperigis intervjueton pri la celo de la debato kaj ankaŭ Studio Brussel intervjuis min. Finfine ĉeestis 30 homoj: 23 Belgoj kaj 7 alilandanoj. Unua parto de la vespero estis pri integriĝo kaj la tiurilataj problemoj. Precipe por Turkoj kaj Marokanoj estas malfacile ĉar ofte ili aŭdas stultajn rimarkojn pri sia eksterajo. Dum la dua parto la Agalev-reprezentantoj klarigis la filozofion de sia partio. Fine venis la vico de nia prezidanto por prezenti la esperanto-movadon. Alex parolis pri la historio kaj la celoj de Esperanto. Montriĝis poste ke neniu de la ĉeestantoj estis kontraŭ Esperanto. Unu sinjoro opiniis ke ĝi estas nur revo. Aliaj personoj diris ke la E-movado devos ankoraŭ multe kreski. La Agalev-anoj estis tre entuziasmaj, ĉar la filozofioj de nia kaj la verda movado tre similas. Ili promesis prezenti la internan ideon de Esperanto al sia partio, por eble enkonduki Esperanton en la lernejojn. Ni estas scivolaj.

**S Milojeviĉ en Moskva gazeto - aug 92 (jdm)**
Ne burokratio sed homa amikeco "Mi volas diri ke la plej grava parto de UK estas tio, kio okazas en la koridoroj inter kunvenoj. La mondo ne ŝanĝiĝos pro proceduraj regularoj, sed ĝi ja povas simple kaj signife ŝanĝiĝi se du homoj renkontiĝas kaj fariĝas amikoj. Mi pensas ke tio estas la ĉefa senco de la kongreso, kaj nia ideala kongreso devas havi duoble malpli densan programon. Mi esperas ke València ne estos tiom granda kongreso". (Vortoj de Simo Miljoviĉ, ĝenerala direktoro de la CO de UEA dum intervjuo en Vieno).

**Ĉina esperanto-movado prosperas (jdm)**
Esperanto estas en Ĉinio jam 90 jarojn. Sekve de la reforma politiko en la fino de la 70-aj jaroj la E-movado, kiel progresa kultura movado, akiris grandan disvolviĝon. Post decembro 1979a, kiam okazis la dua Ĉina Esperanta Laborkunveno, fondiĝis E-asocioj en 28 provincoj (estas 30) kaj en pluraj municipoj kaj aŭtonomaj regionoj. Samtempe 140 urboj grandaj kaj mezgrandaj starigis sian E-organizaĵon. Ekestis aktiva propagando kaj diskonigo de Esperanto, i.a. per tutlandaj kaj lokaj revuoj, gazetoj, radio- kaj televidstacioj. Rezulte de la propagandado fondiĝis en 1981a la societo Amikoj de Esperanto; ĝi nun konsistas el 130 eminentuloj de politika, scienc-teknika, eduka kaj kultura rondoj. En 1982a la ministrejo pri edukado atentigis pri la uzeblo de Esperanto en la instruado. Ekfunkciis 7 porinstruistaj kursoj kaj pretiĝis instruistoj por 78 altlernejoj. Pli ol 6000 studentoj lernis Esperanton. La kvalito de la E-instruado nuntempe gardatas de la Instrua Instituto de Esperanto de Altlernejoj. En 1990a la Centra (plej influhava) Televido unuafoje dissendis esperanto-kurson, kies lernantoj atingis ĉ.4000. Poste ekokazis diversaj agadoj per Esperanto kiaj eldonado de esperanto-literaturo (fondiĝis Ĉina Esperanto-Eldonejo), laborado je scienca nivelo kaj organizado de kongresoj. Esperantistoj de Qingdao uzas Esperanton en komerco, turismo kaj kultura interŝanĝo (ekz. kun Japanio). Iuj esperantistaj organizoj akiris unuapaŝajn atingojn en kondukado de fremdaj kapitalo, instalaĵoj, tekniko, specialistoj k.a. Gravas en Ĉinio nun la esperantistaj karavanoj, kio favoras la interŝanĝon de informoj kaj spertoj inter ĉinaj kaj alilandaj esperantistoj kaj la Pacifika Kongreso kiu jam okazis 5 fojojn.

**Maastricht kaj la Eŭropo de la kulturoj - H Deceuninck - okt 92 (jdm)**
L van de Brande (ministro-prezidento de la flandra registaro) organizis tiun ĉi konferencon sub instigo de la agnosko de la kultura diverseco en la traktato de Maastricht. La flandra registaro volas peri inter la "grandaj kulturoj" kaj pro tio disvolvendas retaro konata sub la nomo ECUALI (Eŭropa Kultura Alianco). Ĝi organizos seminariojn pri ekonomio, scienco, kulturo kaj amaskomunikilaj eventoj. Redakcioj kiujn interesas aperigi tekstojn el la konferenca libro, bv. kontakti H Deceuninck (*).

**Netwerk Vlaanderen kaj Krekelsparen - jun 92 (rr)**
Dum 1992 FEL aliĝis al Netwerk Vlaanderen. Tiu ĉi reto estis fondita antaŭ deko da jaroj, imitante similan asocion en Germanio. Ĝi celas uzi monon laŭ aliaj kriterioj ol tiuj kutime aplikataj de la bankoj: Ne nur gravas la rendimento de la investita kapitalo, sed unualoke la valoro de la investo por la asocio. Subtenon de Netwerk ricevas bone konataj asocioj kiaj Oxfam Wereldwinkels, sed ankaŭ etaj projektoj, ekzemple alternativaj teatrogrupoj kaj lernejoj. Gravan parton de siaj rimedoj Netwerk akiras per "Krekelsparen". Tio estas tute normala ASLK-ŝparkonto (ES-rekening) kun kutimaj rento kaj avantaĝoj, kies posendanto deklaris iĝi "Krekelspaarder". Laŭ kontrakto kun ASLK-ŝparkaso, ASLK pagas ĉiujare procentaĵon (momente 1,30%) de la kapitalo sur tiuj kontoj al Netwerk. Al "aliĝintaj" asocioj Netwerk plupagas parton de la ricevita sumo (momente 0,60%).
Kial ASLK estas tiel malavara? Kvankam la rento je ŝparkonto estas malalta (interesa por ASLK!), ĝi restas populara ĉe la publiko. Ĉar tiu produkto ĉe ĉiuj bankoj estas similaj, la promeso de ASLK donaci procentaĵon al asocio indikita de la ŝparanto povas esti decidiga argumento por "gvidi" la monon al ASLK anstataŭ al alia banko.
"Krekelsparen" certe povos alporti interesajn enspezojn: Taksu kiom da ŝparmono vi kaj viaj konatoj havas (aŭ povas deponi) ĉe ASLK kaj kalkulu 0,60% jare je tiu sumo!

**Brusela Esperantocentro (ah)**
Pro malavara aĉeto de s-ro Mertens(*) Bruselo disponos pri E-centro ekde necerta dato

en 1994. La domo similas al tiu de Antverpeno (posedaĵo de UEA) kaj situas en pliboniĝanta centra bulvardo Leopoldo 2a.
S-ro Mertens mem posedos la domon sed disponigos partojn al ĉiuj E-grupoj kiuj povus ilin utiligi kontraŭ luo laŭ la eblecoj de la grupoj. Laŭ la planoj la 3 supraj etaĝoj estus luigotaj al individuoj (prefere esperantistaj) por havi konstantan enspezon kaj la kelo-kuirejon kaj nulan etaĝon uzus la esperantaj grupoj. La brusela grupo, BEF, Eŭropa E-Unio, E-klubo kaj ILEI jam montris grandan interesiĝon.
S-ro Mertens planas komplete renovigi la domon dum la venontaj monatoj. Serĉata estas ankaŭ domprizorganto, kiu loĝus en la domo mem, kaj kiu povus prizorgi ĉambro(j)n por pasportoservanoj.

**Esperanto en bibliotekoj(n) - sep 93 (jdm)**

Ĉu en via loka publika biblioteko troveblas E-libroj? Nu, en pluraj flandraj bibliotekoj estas. Ĉu multaj? Plej ofte ne. Eblas ŝanĝi tion. Kaj indas.
*Kial do?*
Se libro troviĝas en publika biblioteko tio signifas ke ĝi estas taksita serioza. La enesto de E-libroj en si mem do jam estas bona afero ĉar tiumaniere pruviĝas ke Esperanto estas samrajta al aliaj lingvoj.
*Biblioteko = varbejo?*
Jes! En bibliotekon venas multaj lernemaj homoj. Ankaŭ malfermaj homoj kiujn interesas novaj aferoj kaj do eventuale ankaŭ Esperanto.
*Kiel do?*
Publikaj bibliotekoj funkcias laŭ demokrata principaro. Ili estas je la servo de ĉiuj civitanoj kaj ĉiu civitano rajtas fari proponojn.
Se ankoraŭ ne troviĝas libroj en via loka bib', tiam plenigu specialan aĉetsugestan folieton, kiu normale en ĉiu biblioteko estas havebla. Se vi ne scias kiujn librojn proponi, konsultu spertan esperantiston. Laŭeble ankaŭ zorgu ke oni aĉetu ĉe la libroservo de FEL (afero de duobla profito). Se jam enestas E-libroj, pruntu ilin. Pruntadu la E-librojn por ke la dungitoj rimarku ke ekzistas interesiĝo pri tiaj libroj! Se ne ĉiuj malaperos en la kelon. Ankaŭ pruntu la E-librojn kiuj jam enkeliĝis por reaperigi ilin en la bretaro. Konsilo: tute ne necesas legi la librojn, precipe pruntu ilin!
Poste ne forgesu raporti pri viaj sukcesoj aŭ(!) malsukcesoj.

**Kion fari por informi la gazetaron? (gp)**

*Konstato*
Tre ofte pri la silento de la gazetaro rilate al Esperanto kulpas la esperantistoj mem, kiuj ne aŭ malbone informas.
*Al kiaj ĵurnaloj sendi informojn?*
Laŭ la informoj ni turnu nin al:
- ĝeneralaj gazetoj landaj, regionaj aŭ lokaj, laŭ la graveco de niaj novaĵoj
- senpagaj anoncgazetoj, nur por regionaj/lokaj informoj;
- fakgazetoj por samfakaj informoj

Krome, niaj informoj kongruu kun la politikaj, filozofiaj ideoj de la celita gazeto.
*Kiam ni informu?*
- Antaŭ okazaĵo (kongreso, seminario, prelego, malfermo de novaj kursoj, k.s.), kun invito por ĵurnalisto SE ni antaŭvidas sufiĉe da ĉeestontoj; eblus ridinde venigi ĵurnaliston por kelkaj homoj.
- TUJ post evento (laŭeble per telekopiilo)

*Kiel ni informu?*
1 Nepras konscii, ke gazeto estas komerca entrepreno kiu ne estas je la servo de la Esperanto-movado kaj kies loko estas limigita; sekve ni skribu koncize pri interesaj novaĵoj.
2 Proponita artikolo estu tuj ekspluatebla, sekve tre gravas la aspekto, klareco, konstruo, stilo, gramatika kaj ortografia korekteco.
3 La teksto estu tajpita tre klare:
- kun larĝa marĝeno maldekstre (ĉ. 20 literspacoj)
- kun duobla interlinio
- sur unu flanko de la paperfolio
- kun tre alloga titolo

4 Ni verku ne por E-grupo, nek por ni mem, sed por publiko kiu ne speciale interesiĝas pri Esperanto; tial nepras mencii la plej gravajn faktojn en la unua alineo, kiu estu kiel resumo de la artikolo kaj kiu veku la intereson por plulegi.
5 Ju pli mallonga estas la komuniko, des pli grandaj estas la ŝancoj de publikigo. Por ne forgesi gravajn informojn, ni skribu laŭ la regulo de la 6 K-oj:
KIU? KIO? KIE? KIAM? KIAL? KIOM?
6 Informoj estu precizaj. Ekzemple ni ne skribu "antaŭnelonge" aŭ "pasintan semajnon", sed "la 18an de marto".
7 Informado ne estas propagando. Tamen ni menciu:
- supre: la daton kaj la nomon de la sendanta grupo
- sube : adreson kaj telefonnumeron por pliaj informoj

8 Nepre estas evitendaj: longaj frazoj, fakĵargono, senutila babilado, atakoj kontraŭ personoj aŭ asocioj.
9 Ni respektu la veron ĉar ĉiu rajtas kontroli niajn diraĵojn. Ekzemple, ni ne parolu pri 4.000 UEA-delegitoj, kiam nur ĉ. 2.000 troviĝas en la jarlibro. Same ni ne uzu falsajn argumentojn, ekzemple dirante ke Esperanto estas facila lingvo; tio ne veras, eĉ se ĝi estas dekoble pli facila ol la angla.
10 Laŭeble ni aldonu foton; ĝi estu brila, nigra-blanka, kun mallonga teksto por klarigi ĝin; krome ni klare menciu ke temas pri sola ekzemplero kaj ke ĝi estas senkopirajta.
11 Akompana letero al la ĉefredaktisto aŭ al ĵurnalisto, petu la publikigon kaj indiku eventuale la rubrikon en kiu la artikolo aperu.
12 Se la letero estas publikigita, NEPRE ni danku! Temas pri elementa edukiteco kaj estas okazo por plifirmigi kontaktojn.

Atentu!
Tiuj ĉi konsiloj ne estas magia recepto. Daŭre ni informiĝu ĉe spertuloj kaj laŭeble ĉe ĵurnalisto de la celita gazeto.
*Rekomendindaj libroj:*
- J. JUNGER, S. MAUL, Manlibro pri ĵurnalismo TK-Stafeto, Antwerpen-La Laguna, 1982, 80p.
- F. ANTOINE, J.-F. DUMONT, Ph. MARION, G. RINGLET, Ecrire au quotidien - Du communiqué de presse au nouveau reportage, Vie ouvrière (4, rue d'Anderlecht, 1000 Bruxelles) - Chronique Sociale (7,rue du Plat, 69288 Lyon), 1987, 159p.

**Kiel verki bonan gazetartikolon pri e-o? - S Maul - jun 92 (jdm)**

Antaŭrimarko: ĉi tiuj konsiloj aplikeblas precipe sur loka (urba, regiona) nivelo.
1. Mankas intereso pri e-o: helpe de la gazetoj vi ne povas konvinki homojn pri la

valoro de e-o; la leganto nur akceptas argumentojn kiuj konfirmas siajn jamajn konvinkojn.
2. La limigita celo: maksimume ni veku la intereson de latentaj simpatiantoj, kiuj formas sufiĉe grandan grupon, kaj ni ankaŭ vivtenu ĝin per daŭra informado pri e-o.
3. Persona kontakto kun ĵurnalisto almenaŭ unu fojon: kunportu informan materialon kaj sobre klarigu kio estas e-o (se li tute ne scias). Trankvile respondu ĉiujn liajn demandojn kaj atentigu lin pri temoj taŭgaj por raporto aŭ intervjuo.
4. Raportoj kaj manuskriptoj: per konciza antaŭraporto anoncu en ĵurnaloj gravan okazaĵon esperantan ĉ. unu semajnon antaŭe. Tuj post la okazaĵo liveru tajpitan manuskripton laŭ ĵurnalismaj reguloj.
5. Gazetar-konferenco, intervjuo: nur okaze de gravaj konkretaj aferoj. La intervjuato estu lerta homo kiu ne falas en la kaptilojn de l' ĵurnalisto. Detalajn informojn pri tiu ĉi temo vi trovas en Manlibro pri ĵurnalismo. (El Influo).

# Varbado

**Informa tago Lokeren - 12 sep 92 (jdm)**

Havante kiel taskon varbadon kaj informadon pri Esperanto nia civilservanto Geert Vanhecke organizis informan tagon por gejunuloj en lokerena junulardomo. Kunordigis ĉion kaj rakontis pri la historio de la E-movado Geert mem kaj krome kontribuis al la programo Peter Ameye per montrado de lumbildoj pri kongresoj, Petro De Smedt, enkondukante la ĉeestantojn iomete en la lingvon kaj ties historion, Eddy kaj Ella van den Bosch, kiel ekzemplo de internacia geedziĝo kaj Yves Nevelsteen + Jorg De Mulder por entuziasme rakonti pri junularaj renkontiĝoj. Krom tiuj venis neatendite ankoraŭ esperanta familio. Sufiĉe da konvinkantoj do estis, bedaŭrinde nur malmultaj konvinkotoj. Du pli-malpli jam varbitaj geamikoj venis kun Yves kaj Jorg el Kalmthout kaj el Lokeren mem ĉeestis nur 1 knabino. Tamen Geert anoncis pri la tago per artikoleto en la gazeto de VFJ (Vlaamse Federatie voor Jeugdhuizen) kiu estas eldonata je 2000 ekzempleroj. Krome faldfolioj estis metitaj en la junulardomon kie okazos la informado.
Konkludoj: Necesas eltrovi kiumaniere ja ni reklamu tian tagon por ke venu homoj. Alikaze estas tro granda malŝparo de energio kaj mono. Pli granda kuniĝo de fortoj ankau konsilindas. Tiu ĉi tago tamen estis fruktodona: rezultiĝis nova esperantistino, eĉ tre aktiva estas Els.

> Ĉu ankaŭ vi mencias Esperanton inter la de vi regataj lingvoj kiam vi oficpetas? Almenaŭ Eddy kaj Ella diris al mi ne heziti por kapti la okazon varbeti ankaŭ en tiaj momentoj.

**T-ĉemizo ŝatata de geamikoj (jdm)**

Kiam mi dum festoj en nia junulardomo surhavas mian (nigran) t-ĉemizon de e-o, mi estas rigardata de multaj okuloj. Ofte geamikoj demandas ĉu mi volas turni min por ke ili povu legi la vortojn sur la dorsoflanko (nacilingvajn nomojn de lingvoj). Kutime kunlegas aliaj personoj kaj fojfoje mi responde al demandoj iom rakontas pri e-o. Tiuj al kiuj mi jam rakontis ke mi estas esperantisto ĉiufoje estas rememorigitaj de tiu fakto. Multaj el miaj geamikoj ŝatas la t-ĉemizon (nigro lastatempe altiras la junularon), honoron do al la kreintoj, Hugo Fonteyn kaj Geert Vanhecke. Ankoraŭ haveblas kelkaj blankaj t-ĉemizoj ĉe FEL, krome estas nigraj kaj blankaj puloveroj.

## Merkatado

**Ŝanĝi ekzistantajn strukturojn - okt 92 (pv)**

Ĉu mastrumisto kapablas ŝanĝi strukturojn kiuj ekzistas delonge en entrepreno?
Tiu diskuto ne estas nova en la mondo de tiu scienco. "Nova ĉefo, novaj leĝoj" diras nederlanda proverbo. Ofte eĉ oni dungas iun speciale por ŝanĝi departementon. Sed ĉu li aŭ ŝi vere atingas kion ŝi/li volas restas la demando. Ofte ŝajnas la malnova strukturo pli forta ol la fantaste elpensita strategio de la mastrumisto. Nur supraĵe la strukturo adaptiĝis.
De gravaj sciencistoj pri mastrumado vi povas ekscii ke efektiva mastrumisto realigas tion kion li volas, se li estas konscia pri la 7 interdependaj iloj de la mastrumado. En la angla ili komenciĝas ĉiuj per S, nome *strategy* (kion li volas atingi), *structure* (kio estas, ekzistas), *systems* (disponeblaj iloj), *staff* (dungitaro), *style* (mastrumada stilo), *shared values* (la komuna imago de ĉiuj, entreprena kulturo) kaj *skills* (kapabloj). Nur manipulante ĉiujn li vere mastrumas kaj havas pli grandan ŝancon atingi sian celon.
En Esperantujo estas mastrumantoj je ĉiuj niveloj, homoj kiuj gvidas kaj estis elektitaj por atingi iun celon. Ili havas ideojn kaj planojn por siaj klubo, lando, revuo ktp. Tamen multaj el ili restas frustrataj pro la ŝajna neefektivigebleco de sia revo. Se ili profunde komprenus la signifon de la supre menciitaj 7 S-oj kaj daŭre aplikus ilin je ĉiu mastrumenda situacio, ilia sukcesgrado kaj kontentecnivelo estus multe pli alta.
La prezidanto de FEL ankaŭ konas tiujn principojn kaj klopodas apliki ilin al diversaj situacioj mastrumaj. Seminario praktika en malgrandaj grupoj pri tio estus interesa. Interesitoj anoncu sin ĉe la ĉefredaktoro de Vertikale.

# Interne

**FEL-estraro kunsidis kun flandraj kluboj**

Kortrijk (Jos Vandebergh/ah)
La estraroj de La Konkordo kaj FEL kunsidis je 92.11.06 en Kortrijk. La celo estis reciproka (ek)kon(ad)o. Por La Konkordo ĉeestis J Hanssens, Danielle Demeyere-Sabbe, Piet Glorieux kaj Leo Decooman. Por la FEL-estraro estis A Humet, P Peeraerts, JP Allewaert, R Rotsaert kaj J Vandebergh.
Unue la FEL-estraranoj informis pri diversaj aspektoj de FEL, ĉiam emfazante ke FEL ne estas nur la centro en Antverpeno aŭ ĝia estraro, sed unuavice la esperantistoj al FEL aliĝintaj, la lokaj kluboj kaj fine la E-centro en Antverpeno. Roland parolis pri Krekelsparen, ni diskutis pri Horizontaal, Vertikale, Kontakto, Monato kaj la enketo.
Poste venis la vico de la konkordanoj sin prezenti: Varbado estas tre sukcesa pro la profesieco de Jan Hanssen rilate al la gazetaro. Rezulto de tio estas bona nombro de kursanoj: inter 15 kaj 30 jare. La kluban vivon partoprenas kutime ĉ. 8 klubanoj (el pli ol 100!) kio montras ke la kluba vivo ne ludas la plej gravan rolon en la antaŭenigo de Esperanto. Do eble ni devas ŝpari iom de la energio kiun ni donas al ĝi kaj ataki aliajn ag-kampojn.

**Kion faros Fleja estonte? -**

26/28 mar 93 (yn)
Dum la ne tro ĉeestita Burgunda Semajnfino en marto la aktiva kerno de Fleja iom pripparolis la estontecon de nia junulara asocio. Ni komencis per la KI-vortoj kaj konstatis ke Fleja ne (plu) altiras flandrajn gejunulojn. Tial ni faris kelkajn decidojn.
Unue ni estonte havu nur unu bone organizitan kaj internacian aranĝon kun vera programo anstataŭ pluraj kuirsemajnfinoj kiuj tamen ne allogas la junularon. Eventuale tiuj ĉi aranĝoj povas daŭre okazi ene de la amika rondo, sed ni ne plu internacie anoncos tiujn eventojn.
Due ni partoprenu kiel eble plej amase kaj entuziasme en jam ekzistantaj aranĝoj, kiel la serĉpromenado, la tago de flandraj ardenoj, IS, IJK, kaj Paska Renkontiĝo.
Trie ni zorgu pri la idaro de Fleja per varbadoplano:
- aktivigo de la jam ekzistanta membraro i.a. pere de agotago
- kampanjoj tie kie ni jam estas, nome en Antverpeno, Gento, Loveno; kanaloj: (alt)lernejoj, universitatoj, junulardomoj
- aliaj celgrupoj: Eigentijdse Jeugd, tentenkamp
- festivaloj kiaj Torhout/Werchter
- kunlaboro kun aliaj organizoj: SCI, skoltoj

**Unuopaj grupaj revuoj (G Maertens)**
Siatempe mi arde klopodis unuigi ĉiujn grupajn bultenojn en unu revuon, eĉ ni eldonis dum kelkaj jaroj unu revuon por Benelukso kaj Svislando. Teorie la ideo havas multajn pozitivajn argumentojn, mi ne ripetas ilin. Praktike neniam funkciis bone.
Mia sperto estis ĉiam denove: La manko de akurateco flanke de la grupoj kaj la periodeco flanke de la alternativa revuo praktike malebligis la funkcion. Krome kreskis intertempe ĉe mi iuj konvinkoj kaj kontraŭargumentoj:
- La grupa revuo devas aperi en la momento de neceso, ekz. okaze de iu grupa okazintaĵo; la aperdato de la kupola revuo malofte koincidas.
- Mi konstatis ke kelkaj grupaj membroj (homoj apartenantaj al la tielnomata amika rondo, ne veraj movadanoj, kiuj ekzistas en preskaŭ ĉiu grupo) ne interesiĝas pri niaj organizaj revuoj sed ja pri la grupa revuo, ĉar ĝi ĉefe enhavas personajn sciigojn.
- La nuna produktado de grupa revuo povas esti tre malmultekosta kaj la laboro de la persono kiu volas fari tion estas por la grupo, ne por la landa movado. Ni nun eldonis unu numeron de nia grupa bulteno. Ĝi kostas 1500 BEF po numero, afranko enkalkulita, sed iu varbis anoncon jam por 2000 BEF por la dua numero (tiun saman anoncon oni verŝajne ne povus akiri por la kupola revuo).
- Kontribuoj de iuj grupanoj kontentigas la legantojn de grupa revuo, sed ofte ili ne taŭgas por kupola revuo, kies normoj por la enhavo kaj lingvo devas esti iom pli altaj.
- Oni povas respondi ke pri la tekstoj en la grupaj paĝoj respondecas la grupo, sed temas ne nur pri la sciigoj, sed ekz. ankaŭ pri dupaĝa artikolo verkita de komencanto en simpla lingvo. Oni ne povas aperigi tiun tekston en la kupola revuo pro la spaco, eventuale pro la enhavo kaj ĝuste tia aperigo estas la granda stimulo de tiu persono.
- Se iu volas kontribui al la grupa revuo per mallonga sciigo, oni notas tion rapide sur slipeton kaj la kunmetanto de la revuo transprenas tiun tekston sen multe da cerbumado; la sama teksto efikas tute alie se la kunmetanto de la paĝo en la kupola revuo devas enmeti ĝin por pli ĝenerala legado. Sekve oni ne tiel volonte kunmetos la tekston kaj jen kaj jen ekestas laciĝo, miskunlaboro kaj prokrastoj.

Koncize, mi nur volis pruvi ke la grupa revuo havas propran rolon, ĝuste kiel la klubo mem rolas unike en la movado. Per tio mi ne volas diri ke la grupo estas la baza kaj nepre necesa elemento en la movado, sed ĝi estas valora elemento. La grupa revuo apartenas al ĝi kune kun multaj aliaj ecoj de amika rondo. La problemo de la redaktado kaj kunlaboro estas alia temo temo kiun mi traktos en aparta teksto.

**Pensoj pri la 77a UK (Ĝido) - sep 92 (jdm)**
Problemo de la elekto de la UEA-estraro estas ke la novaj estraranoj ne transprenas, sekve ne daŭrigas la komencitajn agadojn de la antaŭaj estraranoj. Pli grava problemo estas tiu de la rabatoj (por partopreni UK-n kaj simile - red.). La 77a UK alvokas la estraron de UEA urĝe ellabori konkretan planon por laŭeble mildigi la efikon de la aktualaj ekonomiaj malekvilibroj en Eŭropo por la agado de esperantistoj. Krome la kunlaborado inter Eŭropo kaj aliaj kontinentoj estu kreskigita. Sed en la praktiko malpliiĝis la rabato de esperantistoj de malriĉaj landoj por UK, ne estis akceptita la proporcia membrokotizo (ekz. al la nacia enspezo) kaj eĉ estis publike levita propono, kiel malhelpi la aliĝon de malriĉaj kongresanoj (ekz. poloj) al la sekvontaj UK-j. Leviĝis nova penso: oni trovu demokratian solvon por la kotizado, la anoj de UEA kontribuu al la kostoj proporcie. (El Eventoj).

**Renovigo delegita reto - I Jackson - jun 92 (jdm)**
Konstato: la DR estas nepre konservenda. Problemo: ne (plu) ĉiuj delegitoj bone plenumas siajn devojn. Pro tio la delegitoj submetu sin al elekto ĉiun trian jaron. Ili estu elektitaj de la estraro aŭ la komitato surbaze de raporto de la ĉefdelegito. Regionaj delegitoj restos utilaj en grandaj landoj kaj en landoj kun diversaj etne malsamaj lingvoj. Laste la uzo de la reto estu faciligita: oni malpli insistu pri internaciaj respondkuponoj, respondo al peto kiun la petinto povus egale plenumigi alimaniere, estu fakultativa. UEA difinu modelojn por respondi al malkonvenaj petoj. Oni rigore rifuzu trakti petojn en naciaj lingvoj! (Ian Jackson, estas ĝenerala sekretario de UEA).

**UKS minacata de pereo - Malagasio - 92 (jdm)**
Neniu el niaj kursanoj povas kontribue pagi la instrumaterialojn. Grandega inflacio sekve de terura ekonomia krizo kaŭzas ke monata salajro eĉ ne sufiĉas por la baza nutraĵo: la rizo. Multaj familioj manĝas nur tagmeze kaj krome varman akvon trinkas. Vian libervolan kontribuon sendu je la nomo de Universala Kultura Servo - Boîte Postale 1663 - KG. 101 Antananarivo. (Kiam la riĉa esperantista mondo konsciiĝos pri la graveco helpi forigi ankaŭ ekononomiajn malekvilibrojn? -red.)

# Flandra Esperanto-Ligo - Estraro: protokoloj

## Estrarkunsido de septembro 1992

Jean-Pierre Allewaert, protokolanto, malfruas. Pro tio Paul Peeraerts transprenas la protokoladon.

Ĉeestas: Alex Humet, Roland Rotsaert, Jos Vandebergh, Paul Peeraerts kaj parte Jean-Pierre Allewaert.

1. Enketo MONATO: PP sendu la rezulton de la enketo al la estraro.

2. Krekelsparen: Aperu pri tio artikolo en Horizontaal. Krome estos aldonita flugfolio. PP skribu ankoraŭfoje al ĉiuj grupoj por klarigi la intencon. RR parolos pri Krekelsparen en la Bruĝa grupo, JV en la Limburgaj. AH petos al Pieter Vets, ke li verku varbleteron, kiu estu sendita al ĉiuj membroj kaj simpatiantoj. La grupo kiu varbis antaŭ la 31a de decembro plej multajn validajn formularojn, ricevos 10 % de la neta gajno de Krekelsparen pri 1992, la dua 8 %, la tria 6 %, la kvara 4 % kaj ĉiuj aliaj 2 %.

3. Horizontaal: Decidiĝas, ke Horizontaal havu la formaton A4 ekde januaro.

4. SCI: La kurso okazis. 9 personoj ĉeestis, ĉiuj ŝajne entuziasmaj. SCI volas denove ĝin okazigi.

5. Cinio: Manuel Alberto intencas instrui Esperanton en Cinio. La ĉinoj entuziasmas. Proponite estas, ke FEL faru specialan fonduson. Alex zorgos pri varbletero.

6. Brusela grupo: Leviĝis diskuto pri la voĉdonrajto de la Brusela grupo en la ĝenerala kunveno de FEL. La Brusela grupo eksiĝis de FEL. Kiel grupo ĝi do ne rajtas sendi administranton. Personoj el la Brusela regiono kiuj estas membroj de FEL kompreneble kiel individuo havas voĉdonrajton en la ĝenerala asembleo. Se la Bruselo grupo deziras kolektivan abonon je Horizontaal, tio estas ebla, same kiel por la FEL-grupoj. La tarifo estas 250 fr., inkl. AVI, kun minimumo de 10 abonoj. AH informos la Bruselan grupon pri tio.

7. Plia ĝenerala kunsido? Leviĝas la propono organizi plian ĝeneralan kunsidon en kiu oni precipe konigus FEL kaj ĝiajn servojn. Post diskuto decidiĝas ne organizi ion tian sed viziti ĉiujn grupojn unu post la alia. JPA petos la konsenton al Kortrijk, JV al LEL.

8. Prelegvojaĝoj: JPA konsentas iĝi komisiito pri prelegvojaĝoj. Proponoj kaj petoj povas rapide iri al li per telekopiilo (056) 20 46 89 (= laborejo).

## Estrarkunsido de oktobro 1992

Pro foresto de la protokolanto, Paul Peeraerts transprenas la protokoladon.

Ĉeestas: Alex Humet, Roland Rotsaert, Jos Vandebergh kaj Paul Peeraerts.

1. Financoj: La financoj estas kontrolataj. Oni antaŭvidas deficiton de 100000 fr.

2. Vizitoj al la grupoj: Unua vizito okazos en Kortrijk, la 6an de novembro.

3. Monato: Ĝi aperas "terure ĝustatempe". Baldaŭ okazos varbkampanjo inter Francaj kaj Valonaj ne-abonantoj.

4. Kotizoj: AH proponas altigi la kotizon de FEL de 400 ĝis 600 ekde 1994. Li antaŭmetos tion al la ĝenerala asembleo.

5. Esperanto, wat is dat? Tiu faldfolio elĉerpiĝis. AH petis al Geert Vanhecke verki novan tekston. Li kune kun Hugo Fontyn projektos la duan eldonon de tiu faldfolio. Ĉar tamen tio povas daŭri iom, ni ankoraŭfoje represu la malnovan version sen ŝanĝo.

6. Manlibro: Marc Vanden Bempt volus fini la mankantajn ĉapitrojn. Estraranoj rigardu kio ankoraŭ mankas, kaj havigu siajn tekstojn al Marc.

## Estrarkunsido de novembro 1992

La protokolanto ne povas veni. Pro tio Paul Peeraerts transprenas la taskon.

Ĉeestas: Alex Humet, Roland Rotsaert, Jos Vandebergh kaj Paul Peeraerts.

1. Subvencioj: La grupoj de FEL ricevos en 1993 100 frankojn en materialo por ĉiu pruvita aktivec-horo de 1991. PP sendu leteron al ĉiu grupo en kiu li klarigu la sistemon. Krome li petu ke la grupoj sendu siajn ativecraportojn antaŭ la 1a de marto al la sidejo.

2. ILEI: ILEI proponas, ke ĉiu organizaĵo kiu efektivigas Esperanto-kursojn, anigu siajn instruistojn al ILEI. AH proponos tion al la ĝenerala jarkunsido. Estas kompreneble ke grupoj kiuj deziras anigi siajn instruistojn al ILEI povas pagi la kostojn el la bonhavo de la subvencioj (vd. punkton 1).

3. Komuna gazeto FEL-NEA: AH kreos komisioneton por priparoli tiun planon.

4. Horizontaal: Guido van Damme, redaktoro de Horizontaal, plendas pri manko de kunlaboro. AH provos starigi redaktan komisionon kiu povu helpi.

5. Vertikale: Ĝi estas preskaŭ preta. Jorg de Mulder kaj Yves Nevelsteen pretas helpi al ĝia realigo.

6. Manlibro: Sentiĝas la bezono posedi la Manlibron por Aktivuloj ankaŭ sur komputila disko. RR kontaktos Marc Vanden Bempt pri tio.

7. Limburga tago: JV petas protokoli, ke la Limburga Tago okazos la 21an de aŭgusto.

## Estrarkunsido de decembro 1992

La protokolanto ne povas veni. Pro tio Paul Peeraerts transprenas la taskon.

Ĉeestas: Alex Humet, Roland Rotsaert, Jos Vandebergh kaj Paul Peeraerts.

1. Subvencioj: Denove priparoliĝas la subteno al la grupoj de FEL. La 100 fr./hore kiujn la grupoj ricevos (vd. punkton 1 de la novembra protokolo) ne estos kredititaj al la kutimaj kontoj de la grupoj, sed al apartaj kontoj. La mono de tiuj kontoj povos esti uzata nur por subvencieblaj aferoj, kiel ekz.: vojaĝkostoj al Esperanto-aranĝoj (grupoj liveru la vojaĝbileton, aŭ deklaron pri veturitaj kilometroj), afiŝoj, flugfolioj, luo de salonoj, libroj por la biblioteko, ktp. Nesubvencieblaj aferoj estas komercaj varoj, ekz. libroj por la libroservo.

2. Buĝeto: RR faros la buĝeton pri 1993 tuj kiam la spezokonto de novembro estas konata.

3. Valencio: Jos Vandebergh kaj Alex Humet estos la oficialaj reprezentantoj de FEL en la UK en Valencio.

4. Vertikale: AH preskaŭ finis la redaktadon.

Estrarkunsido de januaro 1993

La protokolanto ne povas veni. Pro tio Paul Peeraerts transprenas la taskon.

Ceestas: Alex Humet, Roland Rotsaert, Jos Vandebergh kaj Paul Peeraerts.

1. Spezokonto: Antaŭvidite estas gajno por la jaro 1992. Se efektive estas gajno, oni rezervu grandan parton de ĝi por aĉeto de novaj maŝinoj. La nuna centra komputilo vere estas eluzita kaj paneas regule. Nepre en 1993 oni aĉetu novan. Ni petu jam nun oferton.

2. Vojaĝo Grbo: Eble en marto vizitos nin Bosniano Smail Grbo. Li pretas prelegi en multaj kluboj, ĉefe pri la militmasakroj en Bosnio. Ni kaj la kluboj devos pagi ĉiujn liajn elspezojn. Proponita estas la jena divido:

- Vojaĝkostoj: FEL antaŭpagos la tuton. La duonon ĝi plufakturos al la grupoj en kiuj li prelegos (la grupoj tamen ne vere devos pagi la kostojn, ĉar ilin ni ja povas depreni de ilia bonhavo pro subvencioj).

- Honorarioj: Li ricevos 2000 fr. por ĉiu prelego. Ankaŭ tiun sumon ni dividu laŭ la samaj reguloj kiel la vojaĝkostojn.

- Tranoktado, manĝoj: pri tio zorgos la invitantaj grupoj; ili povas repostuli la monon de FEL, kiu pagos el la "poto subvencioj".

- Asekuro: FEL pagos. AH zorgos pri ĝi kaj pri invitilo.

3. Vojaĝo kubanino: Aktorino-lingvistino ŝatus viziti nin post la UK. La kostoj povus sumiĝi je 50000 fr. Tio havas sencon nur, se ankaŭ grupoj en Francio kaj Hispanio povus kontribui. JPA kontaktos ilin.

4. Horizontaal: La estraro esprimas sian kontenton pri la numero de januaro-februaro, krom pri paĝo 13 kiu aspektas malbona.

5. Vertikale: AH preskaŭ finis la redaktadon.

6. Estontaj kunsidoj: En februaro ne okazos estrarkunsido.

Estrarkunsido de marto 1993

Ceestas: Alex Humet, Roland Rotsaert, Jos Vandebergh kaj Paul Peeraerts.

Denove la protokolanto ne povas veni. PP anoncas ke nepre la nova estraro bezonas funkciantan protokolanton, same kiel sekretarion. Li ne povas daŭre transpreni estrarajn taskojn, des pli pro tio ke li ne sukcesas fini sian propran laboron en la oficejo. La eldonado de MONATO funkcias kontentige kaj la eldonado de libroj iom reviviĝas danke al nova (provizora?) kompostisto Serge Vanryzeghem. Libro de Edwin de Kock estas ĉe la bindisto; libro de Gerrit Berveling estas finkompostata, same kiel la ekzercaro de Emile Van Damme.

1. Investoj

1.1. Ekspozicia materialo: La ĉefa malavantaĝo de nia ekspozicia materialo estas ĝia pezo. Pro tio ni ĝis nun neniam kunportis ĝin al UK por tie pliallogigi nian standon. PP proponas ke ni investu en nova materialo kiu estas pli facile transportebla. Li sugestas ke ni aĉetu la saman materialon kiel Movado sen Nomo nun havas. Konsentite. PP petos oferton kaj traktos kun Ivo Durwael.

1.2. Telefoncentralo: PP ankoraŭ ne trovis tempon por kontakti firmojn kiuj liveras telefoncentralojn. Li nur telefonis al Belgacom, kiu tamen ŝajne ne interesiĝas vendi ion. Li tamen provos baldaŭ inviti kelkajn aliajn liverantojn. Modemo estas aĉetita, kaj "elektronika leterkesto" povos baldaŭ prove funkcii. Definitiva funkciigo eblos verŝajne nur kun nova telefoncentralo.

2. Atestoj por la impostoj: FEL ankoraŭ ne ricevis la permeson por skribi atestojn pri la donacoj faritaj en 1992. PP telefonos al G. Maertens ĉi-teme.

3. Preparo de la jarkunveno:

-Financa raporto: Faros PP.

-Sekretaria raporto: Faros JV.

-Morala raporto: Faros AH.

-Elektojn gvidos PP. Kandidatiĝas por la estraro la samaj kiel pasintjare. Jean-Pierre Allewaert ne jam sciigis pri siaj intencoj. Pieter Vets povus pli aktive partopreni.

-Montriĝas ke nur unu grupo (Limburgo) sendis la nomojn de siaj administrantoj al FEL. Teorie do nur la Limburganoj estus voĉdonrajtaj administrantoj (Noto de PP: ni tiel ŝparus multe da mono, ĉar ni devus publikigi nur iliajn nomojn en la ŝtatgazeto...). AH tamen telefonos al la grupoj antaŭ la jarkunsido kaj petos pri la nomoj de la administrantoj.

-Kotizaltigo: La nova prezidanto proponu al la ĝenerala jarkunsido altigon de la kotizoj ekde 1994. La normala membrokotizo estu 600 fr., el kiuj la grupoj ricevus 250 fr, FEL 316 fr. kaj la impostoj 34 fr.

4. Protokolado: Por senŝargigi PP, estas decidite ke en la kunsidoj protokolos ekde nun alterne alia estrarano.

Estrarkunsido de aprilo 1993

Protokolo ne jam ricevita

Estrarkunsido de majo 1993

Protokolo ne jam ricevita

Estrarkunsido de junio 1993

Protokolo ne jam ricevita

Estrarkunsido de aŭgusto 1993

Ceestas: Roland Rotsaert, Jos Vandebergh, Paul Peeraerts kaj partatempe Alex Humet.

Protokolas: Paul Peeraerts.

Estas nur unu punkto sur la tagordo, la financa krizo de FEL. Montriĝas krizo en du kampoj: 1. likida mono, 2. spezokonto

1. Likida mono: pro investado ĉiu likida mono nun estas blokita. Kutime en la kvietaj monatoj septembro kaj oktobro FEL prenas monon el la ŝparlibreto por povi pagi la salajrojn kaj fakturojn. En la grasaj monatoj, kiam alvenas kotizoj, FEL denove nutras sian ŝparlibreton.

Tio ĉi nun ne funkcias. Eble eblos ankoraŭ pagi la salajrojn de aŭgusto, sed tiujn de septembro verŝajne ne, se ne estas trovita elirvojo.

2. Spezokonto: La saldo de la spezokonto estas pli-malpli nulo nun. Car en la lastaj monatoj de la jaro estas pli da elspezoj ol da enspezoj, 1993 certe portos deficiton. Pro la fakto ke mankas likida mono, ne eblos kompensi tiun deficiton el la bilanco. Se do ne estos trovitaj solvoj, FEL bankrotos antaŭ la jarfino.

Eblaj kaŭzoj pri la krizo:

- forfalo de multaj kompostlaboroj (IPR, Theosoof...)
- forfalo de multaj preslaboroj (Sober voor anderen, k.a.)
- nova fotokopiilo
- malsano de Serge (ĉ. 2 monatojn FEL devis pagi)
- forteco de la franko: Belgio ne plu estas interesa por eksterlandanoj
- nova AVI-leĝo

RR proponas altigi la likidan monon per allogigo de la kurantaj kontoj. Estas decidite, ke

- FEL ne plu donos 10centonan rabaton por 3 aŭ pli da fakturitaj libroj. Restos tamen la ĝisnuna principo ke FEL donos rabaton de 33 % por 3 samaj FEL-libroj kaj 16 % por 3 samaj ne-FEL-libroj.

- Anstataŭe, personoj kun bonhavo sufiĉa por kovri la kostojn de sia mendo, ne pagos afrankon plu. Ili ne ricevos fakturon sed la libroj estos menciitaj en la konteltiro.

- Tiuj personoj povos senpage ĝiri de sia konto al aliaj FEL- kaj UEA-kontoj. Ili povos senpage mendi revuojn.

- Anoncoj aperu en Horizontaal kaj Monato.

PP proponas provizore doni prioriaton al laboroj kiuj rekte enspezigas monon. Akceptite.

Estas decidite fari kampanjon por stimuli al depono en la verda konto. Estu uzataj la malnovaj flugfolioj, kiun noteto ke la rento nun estas 5 %.

Varbado de eksteraj klientoj: okazu ĉefe per personaj kontaktoj, ne per larĝskalaj cirkuleroj.

Klientoj kiuj regule mendas malgrandajn aferetojn (ekspedo de unu-du leteroj, jen kaj jen telefonalvoko) havu konton kun pozitiva saldo. Se ne, oni fakturos al ili kun minimumo de 598 fr. (500 + AVI) en tri monatoj.

Estas decidite redukti la paĝkvanton de Horizontaal al 20 aŭ malpli, laŭ decido de la redaktoro.

FEL provizore ne represu siajn kovertojn, sed uzu blankajn.

Donackampanjo estas prokrastita, ĝis kiam ni scias ion pri la ebleco dedukti la donacojn de la impostoj.

Kampanjo donacaj kartoj okazu tra Horizontaal kaj Monato.

La estraro opinias, ke ankoraŭ havas sencon postĉasi tiujn membrojn kiuj ne rekotizis por 1993. Oni tamen instigu en la letero al pagado ankaŭ por 1994.

PP zorgu kiel eble plej baldaŭ pri katalogeto pri la propraj eldonoj de FEL. Ĝi estu sendita al niaj ĉefaj klientoj.

RR sugestas, ke FEL presu siajn etikedojn laŭ poŝta kodo, eĉ se oni ne ricevas rabaton, por "mildigi la morojn" de la poŝtistoj kiuj devas ordigi niajn revuojn.

Decidite estas fari kampanjon por la uzo de donacaj kartoj. Ili estu numeritaj, por povi kontroli kiom el ili estas resenditaj.

RR sugestas ke la centro aperigu anoncojn pri la novaj libroj jam multe antaŭ la apero, eĉ se oni ne jam scias la ĝustan kostoprezon en tiu momento.

JV proponas

- aperigi anoncon en Horizontaal pri Esperanto Programita.
- denove skribi en Horizontaal pri la ebleco fari testamentojn favore al FEL

Por sanigi la financojn, JV proponas maldungi malbonan oficiston. PP klarigas ke tiu ne ekzistas.

<u>Estrarkunsido de septembro 1993</u>

Protokolo ne jam ricevita

## ADRESARO

Jean-Pierre Allewaert, Tarweln. 10, B-8500 Kortrijk, (056) 20 07 96

Herman Deceuninck, Kluisstr.22, B-1500 Halle

Jorg De Mulder, Beauvoisln. 86, B-2920 Kalmthout, (03) 666 95 98

Helène Falk-Bracke, Eikenlaan 7, B-1640 St.-Genesius-Rode

Alex Humet, Van Campenhoutstr. 4, B-2600 Berchem, (03) 239 21 69

Andre Mertens Goossens, Priorijstr. 4, B-1702 Groot-Bijgaarden

Yves Nevelsteen, Violetln. 7, B-2920 Kalmthout, (03) 666 47 14

Paul Peeraerts, p/a Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen

Germain Pirlot, Steenbakkersstr. 21, B-8400 Oostende

Miĥael Popov, Melitopolska 4-12, UA-332440 Berdjansko, Ukrainio

Roland Rotsaert, Visspaanstr. 97, B-8000 Brugge, (050) 33 00 04 (telekopiilo post 10a sonoro)

Edward Symoens, Putsestwg. 151, B-2920 Kalmthout

Jos Vandebergh, Ambachtstr. 39, B-3530 Houthalen-Helchteren, (011) 52 19 43

Pieter Vets, Wapenhaghestr. 19 2L, B-2600 Berchem, (03) 239 73 67

Raymond Wylleman, A. Vermeylenstr. 65, B-8400 Oostende

# Flandra Esperanto-Ligo

Alex Humet, prezidanto

esperanto internationale taal

Al la administrantoj de FEL
Al la estraro de FEL

Antverpeno 27/10/93

Karaj,

Mi volas anonci al vi, ke ni okazigos Ĝeneralan Kunvenon de FEL je sabato la 20a de novembro 1993 je la 14a horo en la Esperantodomo, Frankrijklei 140, 2000 Antverpeno kun la jena tagordo:

Financoj de FEL (Roland Rotsaert - Paul Peeraerts)

Oficejo de FEL / Esperanto Domo en Antverpeno : Perspektivoj (Paul Peeraerts/Ivo Durwael)

Nova kotizsistemo de FEL (Alex Humet)

Horizontaal - la kontribuo de la lokaj kluboj (Guido Van Damme k.a.)

Vertikale - la komunikado ene de FEL (Jorg De Mulder)

Estraro de FEL - la reprezentiĝo de lokaj kluboj
- estonta prezidanto

Strategiaj demandoj - (Pieter Vets)

Diversaĵoj.

Bv. antaŭanonci vian ĉeeston por tiu grava kunveno!

Kore,

PS : Tiu ĉi kunveno neniel volas anstataŭi la Ĝeneralan Kunvenon de marto, kiu okazos laŭplane fine de tiu monato. Tamen pro la graveco de la situacio, ni konsideris oportune okazigi specialan kunsidon.

*Adreso : Van Campenhoutstraat 4, B-2600 Berchem. Tel +32 3 239 21 69. Fakso +32 2 217 56 60*
*FEL : Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen. Tel +32 3 234 34 00. Fakso +323 233 54 33.*

Monato

multaj kialoj por legi ĝin ĝuste **nun**!




Mendu provekzempleron ĉe Flandra Esperanto-Ligo,
Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio

Flandra Esperanto-Ligo

vlaamse esperantobond v.z.w.

# ORGANIGRAMO

# 1993

*HONORA KOMITATO*

† Emile Cortvriendt, Diepestraat 29, 2060 Antwerpen.
Tlf. (03) 232 44 30.
† Gérard Debrouwere, Magdalenastraat 29, 8500 Kortrijk.
Tlf. (056) 22 76 48.
Fernand Roose, Sinte-Klaradreef 59, 8000 Brugge.
Tlf. (050) 34 30 61.
Edward Symoens, Putsesteenweg 151, 2920 Kalmthout.
Tlf. (03) 666 62 66.
\+ Cesar Vanbiervliet, Oudenaardsesteenweg 158, 8500 Kortrijk.
Tlf. (056) 22 00 11.
Jules Verstraeten, Sint-Bernardsesteenweg 1078, 2660 Hoboken.
Tlf. (03) 827 66 43.

*ESTRARO*

Prezidanto:
Alex Humet, Campenhoutstraat 4, 2600 Berchem.
Tlf. (03) 239 21 69.
Sekretario:
Jos Vandebergh, Ambachtstraat 39, 3530 Houthalen.
Tlf. (011) 52 19 43.
Financoj:
Roland Rotsaert, Visspaanstraat 97, 8000 Brugge.
Tlf. (050) 33 00 04.
Membroj:
Jean Pierre Allewaert, Tarwelaan 10, 8500 Kortrijk.
Tlf. (056) 20 07 96.
Jan Bovendeerd, Meidoorn 42 bus 2, 2640 Mortsel.
Tlf. (03) 449 50 06.
Jorg De Mulder, Beauvoislaan 86, 2920 Kalmthout.
Tlf. (03) 666 95 98.
Pieter Vets, Wapenhaghestraat 19 2L, 2600 Berchem.
Tlf. (03) 239 73 67.

*KOMISIITOJ*

Financoj:
Roland Rotsaert, Visspaanstraat 97, 8000 Brugge.
Tlf. (050) 33 00 04.
Bibliotekoj:
Yves Nevelsteen, Violetlaan 9, 2920 Kalmthout.
Tlf. (03) 666 47 14.
Eldona agado:
William Auld, Gerrit Berveling, Chris Declerck, Rejna de Jong,
Alex Humet kaj Paul Peeraerts.
Manlibro de la aktivulo:
Marc Vanden Bempt, Duisburgsestraat 12, 3001 Heverlee.
Tlf. (016) 20 14 53.
Gazetara servo: vakas.
Informado:
Edward Symoens, Putsesteenweg 151, 2920 Kalmthout.
Tlf. (03) 666 62 66.



Instruado:
Raymond Wylleman, A.Vermeylenstraat 85, 8400 Oostende.
Tlf. (059) 50 27 08.
Komitato de UEA:
Alex Humet.
Rebata servo:
Germain Pirlot, Steenbakkersstraat 21, 8400 Oostende.
Tlf. (059) 70 87 00.
Prelegvojaĝoj:
Jean Pierre Allewaert, Tarwelaan 10, 8500 Kortrijk.
Tlf. (056) 20 07 96.

*GRUPOJ - ADMINISTRANTOJ*

*ANTVERPENO*

**La Verda Stelo**

Korespondadreso:
"La Verda Stelo", Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen.

Prezidanto:
Jan Bovendeerd, Meidoorn 42 bus 2, 2640 Mortsel.
Tlf. (03) 449 50 06.
Vicprezidanto:
Jacques Schram, Hof ter Beke 49, 2018 Antwerpen.
Tlf. (03) 237 86 02.
Sekretario:
Clara Durwael, Paul Gilsonlaan 5, 2650 Edegem.
Tlf. (03) 440 30 92.
Kasisto: Clara Durwael.
Administrantoj de FEL:
Jan Bovendeerd, Meidoorn 42 bus 2, 2640 Mortsel.
Tlf. (03) 449 50 06.
Alex Humet, Campenhoutstraat 4, 2600 Berchem.
Tlf. (03) 239 21 69.
Pieter Vets, Wapenhaghestraat 19 2L, 2600 Berchem.
Tlf. (03) 239 73 67.

**La Erikejo**
Prezidanto:
Jorg De Mulder, Beauvoislaan 86, 2920 Kalmthout.
Tlf. (03) 666 95 98.
Vicprezidanto:
Stella De Weerd, Sierkerslaan 17, 2940 Stabroek.
Tlf. (03) 568 75 59.
Sekretario:
Mireille Storms, Douglaslaan 14, 2950 Kapellen.
Tlf. (03) 666 83 19.
Kasisto:
Erhard Boehme, Plantinlaan 10, 2940 Stabroek.
Administranto de FEL:
Yves Nevelsteen, Violetlaan 7, 2920 Kalmthout.
Tlf. (03) 666 47 14.

**BRABANT**

**Esperanto 2000**

Korespondadreso:
"Esperanto 2000", R. Ménadastraat 44, 1320 Hamme-Mille.

Prezidanto:
Bart Demeyere, Drift 26, 8420 Wenduine.
Tlf. (050) 42 90 44.
Sekretario:
Roger Goris, R. Ménadastraat 44, 1320 Hamme-Mille.
Tlf. (010) 86 01 12.
Kasisto:
André Wollants, Maleisenstraat 86, 3020 Herent.
Tlf. (016) 23 74 18.
Administrantoj de FEL:
Ghislain Jacobs, Kerkstraat 97, 3010 Kessel-Lo.
Tlf. (016) 26 16 83.
Marc Vanden Bempt, Duisburgsestraat 12, 3001 Heverlee.
Tlf. (016) 20 14 53.

**LIMBURG**

**Limburga Esperanto-Ligo**
Prezidanto:
Jos Vandebergh, Ambachtstraat 39, 3530 Houthalen.
Tlf. (011) 52 19 43.
Sekretario:
Albert Claesen, Zonnebloemstraat 13, 3590 Diepenbeek.
Tlf. (011) 32 36 03.
Kasisto:
Albert Claesen.
Administrantoj de FEL:
Peter Berx, Havermarkt 39 bus 7, 3500 Hasselt.
Tlf. (011) 23 30 93.
Mathieu Habex, Gildelaan 27, 3600 Genk.
Tlf. (089) 35 95 42.
Gustaaf Rombaut, Zandhoefstraat 156, 3583 Beringen-Paal.
Tlf. (011) 42 80 20.
Jos Vandebergh.

**Beringen**
Prezidanto:
Jos Lemmens, Maasheidestraat 7, 3580 Beringen.
Tlf. (011) 42 28 36.
Sekretario:
Gustaaf Rombaut, Zandhoefstraat 156, 3583 Beringen-Paal.
Tlf. (011) 42 80 20.
Kasisto:
Gustaaf Rombaut.



**Genk**
Prezidanto:
Mathieu Habex, Gildelaan 27, 3600 Genk.
Tlf. (089) 35 95 42.
Vicprezidanto:
Hendrika Mandervelt, Gildelaan 27, 3600 Genk.
Tlf. (089) 35 95 42.
Sekretario:
Willy Minnen, Loskaaistraat 6, 3600 Genk.
Tlf. (089) 35 07 13.
Kasisto:
Willy Minnen.

**Hasselt**
Prezidanto:
Peter Berx, Havermarkt 39 bus 7, 3500 Hasselt.
Tlf. (011) 23 30 93.
Sekretario:
provizore mankas.
Kasisto:
Albert Claesen, Zonnebloemstraat 13, 3590 Diepenbeek.
Tlf. (011) 32 36 03.

**Houthalen**
Prezidanto:
Jos Vandebergh, Ambachtstraat 39, 3530 Houthalen.
Tlf. (011) 52 19 43.
Vicprezidanto:
Leon Geysmans, Lariksenstraat 13, 3530 Houthalen.
Tlf. (089) 38 17 77.
Sekretario:
Alfons Lijnen, Grote Baan 156, 3530 Houthalen.
Tlf. (011) 52 20 74.
Kasisto: Alfons Lijnen.

**Peer**
Henri Schutters, Panhovenstraat 10, 3990 Peer.
Tlf. (011) 63 55 92.

**OKCIDENT-FLANDRUJO**

**Paco kaj Justeco**
Prezidanto:
André Dumarey, Blekerijstraat 32, 8310 Brugge-Assebroek.
Tlf. (050) 35 48 13.
Sekretario:
Johan Van Eeno, Peperstraat 72, 8000 Brugge.
Tlf. (050) 34 71 92.
Kasisto:
Raymond Defrancq, Rietlaan 57, 8200 Brugge-St-Michiels.
Tlf. (050) 38 11 88.
Administranto de FEL:
Fernand Roose, Sinte-Klaradreef 59, 8000 Brugge.
Tlf. (050) 34 30 61.

**La Konkordo**
Prezidanto:
Jan Hanssens, Meiweg 23, 8500 Kortrijk.
Tlf. (056) 21 31 06.
Sekretario:
Jan Hanssens.
Kasisto:
Danielle Sabbe-Demeyere, Winterland 23, 8501 Heule.
Tlf. (056) 35 55 35.
Administrantoj de FEL:
Jean Pierre Allewaert, Tarwelaan 10, 8500 Kortrijk.
Tlf. (056) 20 07 96.
Jan Hanssens.

**La Konko**
Korespondadreso:
"La Konko", Paul Michielslaan 10, 8400 Oostende.

Prezidanto:
Raymond Wylleman, A.Vermeylenstraat 65, 8400 Oostende.
Tlf. (059) 50 27 08.
Vicprezidanto:
Flory Witdoekt, Witte-Nonnenstraat 9A, 8400 Oostende.
Tlf. (059) 70 29 14.
Sekretario:
Marc Cuffez, Elisabethlaan 295, 8400 Oostende.
Tlf. (059) 80 85 17.
Kasisto:
André D'Hulster, Paul Michielslaan 10, 8400 Oostende.
Tlf. (059) 80 06 95.
Administranto de FEL: provizore mankas.

**Knokke**
Prezidanto:
Albert Marmenout, Helmweg 7, 8300 Knokke-Heist 1.
Tlf. (050) 60 55 35.
Administranto de FEL: provizore mankas.

## ORIENT-FLANDRUJO

**La Pioniro**
Prezidanto:
Mari-Roza De Wolf, Botermelkstraat 100. 9300 Aalst.
Tlf. (053) 78 26 04.
Sekretario:
Hugo Dossche, Asserendries 103, 9300 Aalst.
Tlf. (053) 70 17 89.
Kasisto:
Clement Amant, Brakelstraat 52, 9300 Aalst.
Tlf. (053) 21 31 56.
Administranto de FEL:
Hilde Wauters, Gentsesteenweg 108, 9300 Aalst.



**La Progreso**
Prezidanto:
Katja Lödör, Peter Benoitlaan 117, 9050 Gentbrugge.
Tlf. (09) 230 16 77.
Vicprezidanto:
Patrick Haerick, Zilverberklaan 25, 9032 Wondelgem.
Tlf. (09) 227 02 15.
Sekretario:
Ingrid Lievens, Oude Bareelstraat 10, 9041 Oostakker.
Kasisto:
Hans Delnat, J. Lambrechtstraat 8, 9000 Gent.
Tlf. (09) 221 10 02.
Administrantoj de FEL:
Ingrid Lievens, Katja Lödör.

***KOOPTITAJ ADMINISTRANTOJ***

Gilbert Cardoen, Violierenlaan 5, 8940 Wervik.
Tlf. (056) 31 26 29.
Roland Rotsaert, Visspaanstraat 97, 8000 Brugge.
Tlf. (050) 33 00 04.

***ADMINISTRANTOJ-FUNKCIULOJ***

Paul Peeraerts, Baron Dhanislaan 13, 2000 Antwerpen.
Tlf. (03) 234 34 00 (dum oficejaj horoj).
Guido Van Damme, Haantjeslei 31, 2018 Antwerpen.
Tlf. (03) 234 34 00 (dum oficejaj horoj).
Jorg De Mulder, Beauvoislaan 86, 2920 Kalmthout.
Tlf. (03) 666 95 98.

**FLEJA**
Prezidanto:
Stefaan Cottenier, Bozestraat 108, 8501 Heule.
Tlf. (056) 35 33 30.
Vicprezidanto:
Wim Slootmans, J. Moretuslei 74A (G), 2610 Wilrijk.
Tlf. (03) 820 24 54.
Sekretario:
Yves Nevelsteen, Violetlaan 9, 2920 Kalmthout.
Tlf. (03) 666 47 14.
Kasisto:
Eddy Van den Bosch, Kon. Astridplein 4, 9150 Kruibeke-Bazel.
Tlf. (03) 774 00 48.
FEL-administranto:
Jorg De Mulder.
TEJO-komitatanoj:
Stefaan Cottenier.
Jorg De Mulder (anstataŭanto), Beauvoislaan 86, 2920 Kalmthout.
Tlf. (03) 666 95 98.

**KUNLABORANTAJ ASOCIOJ**

Belga Esperantista Fervojista Asocio
Lucien De Sutter, Frère-Orbanstraat 210, 8400 Oostende.
Tlf. (059) 50 18 25.

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj
Raymond Wylleman, A.Vermeylenstraat 65, 8400 Oostende.
Tlf. (059) 50 27 08.

Belga Ligo de Katolikaj Esperantistoj
Hubert Audenaert, Beekstraat 6, 9160 Lokeren.
Tlf. (09) 348 44 56.

Skolta Esperanto-Ligo - Belgio
Prezidanto:
Arie Bouman, Driesdreef 8, 9030 Mariakerke.
Tlf. (09) 227 48 41.
Sekretario:
Nico Boon, Merelhof 8, 3300 Tienen.
Tlf. (016) 81 52 48.

Esperanto-Centrum Nederland
ECN, Riouwstraat 172, 2585 HW Den Haag, Nederlando.
Tlf. 00 31 (70) 355 66 77.

Association pour l'Espéranto (APE)
Prezidanto: George Sossois
79 rue du Basson, 6001 Marcinelle. Tlf. (071) 43 62 05.
Sekretario: Simonne Fichefet
rue J. Destrée 104, 6043 Ransart. Tlf. (071) 35 46 87.
Kasisto: Marcel Delforge.

Belga Esperanto-Federacio (BEF)
Prezidanto: Georges Sossois.
Vicprezidanto: Jos Vandebergh
Ambachtstraat 39, 3530 Houthalen. Tlf. (011) 52 19 43.
Sekretario: Philippe Van Damme.
Briljantstraat 21, 1170 Brussel. Tlf. (02) 673 75 96.
Kasisto: Marcel Delforge.

Korespondadreso APE/BEF kaj informoj pri planataj aktivecoj
Marcel Delforge, 16 rue des Glacières, 6001 Marcinelle.
Tlf. (071) 43 14 13.